

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond pri la esperantista skiferio en Adelboden.

La 26-an de decembro mi anoncis al vi la malfermon de nia skiferio, el kiu mi diris al vi miajn novjarajn bondezirojn. Hodiaŭ mi volas iom rakonti al vi pri tiu manifestacio.

Por la sesa fojo, kaj denove kun granda sukceso, ni retrovis nian simplan lignodomon, aŭ pli taŭge ĉaledon. Estis interese ekzameni la mienon de la alvenintoj, kiam pro la malalteco de la pordoj ili devis fari grandan riverencon por eviti ricevi dolorigan frapon ĉe la kapo. Kiel vi konstatas, la loĝejo estis iom primitiva, sed tio neniam malebligis agrablegan kunvivadon en simpatia samideana atmosfero. Ĉiuj partoprenis al la interna doma laboro : kuirado, telerlavado, purigado.

Tiun ĉi vintron ni estis iom malpli ol kutime. Venis 13 partoprenantoj el Britio, Francio, Hispanio kaj Svislando. Kaj ĉiutage, kiam la vetero tion permesis, je la naŭa matene ni forlasis la ĉaledon por malkovri unu el la belaj pejzaĝoj de la regiono. Dufoje ni veturis per buso kaj seĝlifto ĝis la pasejo Hahnenmoos (2000 m), el kie ni povis ascendi sur belegaj suproj. Ni tiam povis admiri centojn da montoj kaj glaciejoj plej diversformaj. La skikomencantoj ŝatis tiun regionon, ĉar ili trovis facilajn deklivojn, dum la aliaj povis profiti pri du skiliftoj kaj ekzerci la novan teknikon julante elegante kun plezurego kaj entuziasmo. Alian fojon per telfero ni supreniris altegan kaj abruptan rokaron por atingi belan fund-ebenan valeton ĉe la piedo de la glaciejo Wildstrubel. Kaj dum tuta posttagmezo de suprenirado per feloj ni atingis pasejon apud roka pinto nomata Tschingelochtighorn (2700m). Dum ni laŭiris longan eĝon ni povis observi grupon da ĉamoj saltantaj en abrupta deklivo. Oni sin demandas, kiun nutraĵon trovas en vintro tiuj sovaĝaj ruminantoj, kiuj loĝas je la alteco de 2000 m. Bedaŭrinde tempesto subite leviĝis, kiam ni preskaŭ atingis la supron, kaj pro ĝi ni preskaŭ ne povis admiri la panoramon pro la malvarmega ventego. Ĝojige dum la pasintaj vintroj ni jam estis farintaj diapozitivojn pri tiu pejzaĝo, kaj tiel ĉiuj povis ĝin trankvile admiri vespere en la ĉaledo. Schwandfeldspitz estas ankaŭ tre bela skiregiono apud Adelboden. Seĝlifto ĝin permesas rapide atingi. Plej diversaj skiadejoj donas al ni la impreson malkovri eterne novajn pejzaĝojn kun belaj abioj kaj alpaj dometoj, kiuj siluetiĝas antaŭ neĝplena montaro.

Nia ĉaledo situis en tre agrabla loko, inter du skiliftoj. Do kiam ni rezignis ekskursi ĝis monta restoracio kaj do tagmanĝis en la domo, la skiemuloj povis ĉu descendi la facilajn skiadejojn de la Kuonisbergli, ĉu sin riski ĉe la pli dekliva Fleckli, el kie oni havis la impreson, ke se oni falus, oni riskus plonĝi ĝis la vilaĝo Adelboden, kiun ni vidis en la profundo sub niaj skioj.

Se inter vi, karaj geaŭdantoj, troviĝas skiemuloj, ili devas senti siajn piedojn, kiuj komencas gliti. Eble ili havos envion vidi ankaŭ iam tiun belan skiparadizon Adelboden. Kaj ili nur sciu, ke dum tiuj dek tagoj la neĝo ĉiam mirinde agrable konvenis al la skiado. Ni povis ŝusi sentime, ĉar eĉ en la leĝere profunda neĝo ni povis facile kristianii. Kaj post ni leviĝis tiam neĝa nuboj.

Por la neskiantoj ni tamen diros kelkajn vortojn pri la doma vivo. Matene la dormemulojn vekis muziko, kaj post la frumanĝo la partoprenantoj dividiĝis en du grupojn : dum la lertaj esperantistoj telerlavadis kaj okupiĝis pri la dommastrumado, la komencantoj devis studi esperanton verkante raportojn. Kaj dum la tuta tago oni severe punis la krokodilantojn, ili devis telerlavadi vespere.

Dum kelkaj vesperoj ni ripozis rigardante diapozitivojn, sed dum aliaj ni serioze diskutis pri la socia, idea kaj lingva aspektoj de nia movado kaj pri la ita-ata-kverelo. Tiam okazis vigla diskuto preskaŭ ĝis meznokto, dum kiu eĉ la komencantoj flame parolis. Tio montras, ke gramatiko ne nur estas enuiga afero.

Inter ni troviĝis inĝeniero pri atomenergio. Dank'al li ni havis tre interesan vesperon, dum kiu ni povis diskuti pri aktualegaj demandoj. Partoprenintoj el la kampadejo Primošten raportis pri siaj impresoj. Kaj dum du vesperoj ni festis : ni salutis la tutan valon per la krioj « Bonan novan jaron ! » kaj dum la reĝfesto ni ankaŭ bone amuziĝis. Dum alia vespero ni havis kontakton kun la posedanto de la ĉaledo, vigla maljunulo, kiu parolas kvin lingvojn : la svisgermanan, la germanan, la francan, la anglan, la italan kaj lernas sesan : la silentadon ! Humure li rakontis al ni regionajn ŝercojn kaj kantis strangajn popolajn kantojn.

Ni tiom skiis, festis, ĝojis, ke subite ni rimarkis, ke jam alvenis la momento adiaŭi. Bedaŭrinda sed deviga momento.

Por mi ankaŭ venis la momento adiaŭi vin, karaj geaŭskultantoj. Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la prezidanto de Esperanto-Edukistraro de Svislando, pri la esperantista skiferio en Adleboden. Ĝis reaŭdo !

-oOo-